

La Brita Esperantisto

Septembro-Oktobro 1986



La Esperanta Societo de Burnley fondiĝis en 1906. Antaŭ la unua mondmilito ĝi estis tre aktiva, ekzemple en 1909 okazis kvin malsamaj kursoj en kiuj partoprenis ĝis 180 homoj. La relative juna membraro multe piedekskursis. La ĉi-kuna foto montras ekskurson de la Burnleyanoj en 1914. La foton liveris Stephen Aldridge.

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

82A Jaro, N-Ro8 72

Septembro-Oktobro 1986

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

JES AL HISTORIO

Hilary Chapman

Mia artikoleto en *La brita esperantis-to* (majo-junio 1986) rilate la historion de la lingvo venigis pli grandan reagon ol mi antaŭvidis. Pluraj homoj telefone subtenis mian proponon, sed mi menciis kelkajn skribajn reagojn, kiuj atingis min.

Peter Forster skribis, ke li "plene subtenas la ideon" de organizaĵo por studi la historion de la lingvo kaj li aludas la amplekson de la farota esplorado. Lia libro, eldonita en 1982, baziĝas sur verkoj eldonitaj prefere ol sur arkiivoj. Li timas, ke multaj paperaĵoj baldaŭ perdiĝos.

Sandra Slade listigis plurajn eventualajn esplorkampojn, kaj sugestas, ke la fondota Societo unue starigu en Britujo, por poste atingi pli vastan internacian membraron kunlabore kun UEA.

Kris Long skribis interalie, ke "man-kas informoj – ne, simple *oni ne scias* pri pioniroj". Li opinias, ke anglalingvaj artikoloj pri historiaj temoj aperu en anglalingvaj revuoj.

David Featherstone mencias sian deziron "scii plu pri verkintoj aŭ tradukintoj de himnoj". Li aldonas, ke "Estus tre utile se oni povus meti ĉiun informon sur komputila disko, por ke ĝi estu facile havebla".

Katelina Halo "forte konsentas" pri la bezono por tia societo, kaj proponas, ke ĝi eldonu revuon kun paralelaj tekstoj dulingvaj.

Sinjoro Rutter atentigis, ke li posedas la fruajn protokolarojn (1903-1909) de la Esperanto-Societo en Newcastle kaj li bonvolis provizi historion pri tiu societo kaj aparte pri la Ido-skismo tie. (Efektive ni ankoraŭ scias malmulton pri la efiko de la Ido-skismo je loka nivelo).

Bill Simcox informis surbaze de protokolaro pri la unua jaro de Esperanto-societo en Stoke-on-Trent en 1909.

Ron Calder helpas ĝisdatigi jam eldonitan historieton pri la Esperanto-Societo de Edinburgo.

Neil Salveson skribis, "Mi sentas, ke ni riskas perdi nian historion, kvankam mi ankaŭ kredas, ke ni renkontas nin mem tra landoj kaj tra tempoj kiam ni venas vidalvide antaŭ aliaj esperantistoj. Vi tute pravas pri la maniero laŭ kiu eĉ nur protokolaro ekzemple de loka grupo prilumas la movadon: tion mi trovis kiam pli malpli hazarde venis al mi la protokolaro de la mortinta Roĉdala societo; tie oni vidas ian transiron de ĉefe vira al ĉefe virina grupo, de uzado (almenaŭ en la teksto) de Esperanto baldaŭ formale ĝusta tra kripla lingvaĵo al la angla, de etoso de kleriga al izolata bando".

Bruno Najbaro alsendis kraĵone verkitan raporton anglalingvan de Joseph Rhodes pri la Unua Kongreso.

Kuraĝigite de la reago kaj timante, ke gravaj historiaj dokumentoj malaperas, mi skribis fine de junio kaj dum julio 1986 al multaj ĵurnaloj kaj revuoj tra tuta Britujo, petante informojn de la ĝenerala publiko. Kunlaborantoj nun kontaktas tiujn eldonaĵojn al kiuj mi ne skribis. Je mia granda miro kaj ĝojo, tiuj leteroj aperis en grandega nombro de ĵurnaloj (kvindek kvin ĝis la 20a de julio)! En pluraj lokoj ĝi aperis en formo de artikolo eĉ kun la jubilea simbolo aŭ kun esperanta titolo. Mirigis min ankaŭ la reagoj de la neesperantistoj aŭ eksesperantistoj. (Tiuj respondintoj nombras kvardek tri je la 20a de julio!).

Graflanda arĥivisto sciigis pri dokumentoj en sia arĥivejo, sed skribis ankaŭ multaj ordinaraj homoj, kiuj iam havis kontakton kun la lingvo kaj movado. Kolektanto de poŝtkartoj disponigis al mi dek du poŝtkartojn kun esperanta teksto, kiujn esperantistoj el Sankta Peterburgo kaj Finnlando sendis al

anglo jam antaŭ la unua mondmilito. Sepdekdu-jara virino, Nellie Wylie, skribis el Manĉestro, parte en Esperanto. Estante nun 72-jara, en sia junaĝo ŝi ne povis ricevi edukon kaj ŝi laboris en ĉemizfabriko. Esperanto helpis eduki ŝin pri la vasta mondo. Ŝi rakontis, ke ŝi tre fieris montri al kunlaborantinoj leterojn de plumamikoj en foraj landoj.

KIEL ANTAŬENIGI LA MOVADON

Dum pasinta kunveno en nia klubo la programo estis prezentita far Paŭlo sub la supra titolo. Li ekpensis la metodon kiun li prezentis al ni post ol li sciis pri la vendado de poŝtkarta kolekto apartenanta al malnova klubanino S-ino N—. Ŝi mortis 93-jara antaŭ iuj monatoj. Ni ne vidis ŝin en la Klubo de jam sep aŭ ok jaroj, sed ŝi esperantiĝis en 1928, same kiel ŝia unua edzo. S-ino N— konservis ĉiun poŝtkarton kiun ŝi kaj la edzo ricevis dum pli ol kvindek jaroj. Ŝi venis al nia urbo kun la dua edzo, kiu, kvankam simpatianto al nia ideo, neniam lernis la lingvon. Unu el la nepoj portis la dek ses kartonajn skatolojn al parkumeja bazaro kaj, laŭ la raporto de Paŭlo, dum tri dimanĉoj li vendis la, pli-malpli, 5,000 kartojn kaj ricevis £874.40. Multaj homoj demandis al la nepo, dum la vendado, pri la lingvo sur la poŝtkartoj kaj pluraj montris intereson pri ĝi. La sciigo pri la vendado donis ideon al Paŭlo por propagandi Esperanton per vendado de poŝtkartoj kiujn ni ricevas de amikoj el multaj landoj. Li klarigis kiamaniere ĉiu klubano povas ricevi almenaŭ 20 poŝtkartojn jare kaj se 20 homoj donacos ĉiun poŝtkarton al la Klubo, je la fino de unu jaro ni havos 400 poŝtkartojn por vendi, eble pli, se oni reklamas en "Esperanto News". Antaŭ ol oni vendos ilin, li sugestis ke oni stampu ilin per la vorto "Esperanto" aŭ "Korespondas en Esperanto" en taŭga loko, se jam la mencio de la lingvo ne aperas sur la poŝtkarto. Kaj se oni ricevos almenaŭ

Geoffrey Stobie skribis pri sia patro, taksiiŝto en Londono dum la dudek-kaj tridek-jaroj. Tuta aro de taksiiŝtoj-esperantistoj kunvenis tiam ĉe "Romano's Café", kafejo sub fervoja ponto en la distrikto Charing Cross. Dum ili atendis, la taksiiŝtoj (inter kiuj troviĝis franco) interparolis nur en Esperanto.

20 penceojn po karto ni gajnos inter £80 kaj £100. Al interesitoj ni povos doni la unuan lecionon de la senpaga kurso. Do, ni kaj ricevos monon kaj propagandos per praktika montrado de la lingva uzo. "Tre praktika ideo!" Paŭlo konkludis.

Poste en "La Ora Ŝafpelto" ni komentis kaj esploris la plurajn metodojn per kiuj homoj celis, celas kaj celos porti nin al la fina venko. Du el la ĉeestantoj sen iom da hezito menciis planon de viro, kiu opiniis, ke la plej efika metodo estas krei urbon kie ĉiu parolos Esperanton, kaj li reklamis la celon en movadaj revuoj petante al samideanoj iri kaj loĝi en la urbo kie li mem loĝis. La provo ĉesis pro lia tragika morto. Ni ĉiuj scias pri iu plano aŭ alia por skribi amase al eminentuloj kaj organizaĵoj en diversaj partoj de la mondo, informante ilin pri nia lingvo, atendante ke post ricevo de abundaj leteroj favoraj al Esperanto, ili, fine, lernos ĝin. Kaj ni ankaŭ scias pri la kolektado de subskriboj en laborejoj, drinkejoj aŭ bazaroj, por peti ke la registaro subtenu Esperanton aŭ ke la lingvo estu instruata en la lernejoj; pluraj el ni kolektis subskribojn dum la kampanjo starigita de U.E.A. en 1947, sed la milionoj da subskriboj prezentitaj al la Unuiĝintaj Nacioj ne donis rikolton. Kompreneble, estis menciitaj la pluraj ideoj pri reklamado abunda en jurnalaj, aŭtobusoj, fervojaj stacioj, televido, k.t.p., sed la abunda reklamadado restis ideo pro manko de mono! Estis

propono pri presado sur necesa kaj utila ĉiutaga artikolo, de la devizo "Lernu kaj Uzu Esperanton" sur ĉiu folio. Nur paŝo for de la sapo vendita antaŭ jaroj en kluboj kaj federacioj!

La enfluanta biero aktivigis la mensojn, kaj Adelino, silenta ĝis nun, proponis ideon tute nova: ĝi estis la kreado de homida trupo kun naŭ dancistinoj kiuj distros dum kunveno de rotarianoj, leonoj, alkoj kaj aliaj kluboj viraj. Laŭ ŝi la trupo dancos laŭ menila melodio, lante, kiel estas movada kutimo, dum iom post iom ili nudiĝas ĝis restos nur tri verdaj steloj, en strategiaj pozicioj, tiam dum sonas la fina kadenco de la muziko ili turniĝas kaj oni vidos naŭ literojn . . . sur naŭ strategiaj lokoj!

Adelino, per sia impertinenta propono, sukcesis, kiel ŝi ofte faras, malseriozigi la tonon de la diskuto. Estis tiam kiam Berto, kiu tre malofte retorikas, forigis la pipon el la buŝo kaj informis nin pri la papago de malnova samideano loĝinta en orienta marborda urbo. Ĉi tiu ulo havis papagon kiu diris: "Kiel vi fartas?" kaj daŭre proponis ke pluraj grupanoj de la regiono akiru papagojn kaj instruu al ili esperantajn vortojn, tiam oni povus prezenti spektaklon de ses aŭ sep birdoj parolantaj la lingvon! Ĉar la drinkantoj kredis, ke tiu estis nur ideo naskita de la menso de Berto pro biera influo, mi atestis ke jam antaŭ jaroj ankaŭ mi aŭdis pri tiu papago. Post dancistinoj kaj papagoj la proponoj devenis pli kaj pli bizaraj kaj strangaj.

En la movado pululas homoj kun ideo por universaligi la lingvon, kaj ĉiu opinias ke per sekvado de lia ideo ni fine sukcesos: vendante poŝtkartojn kaj sapon, kolektante subskribojn, kantante, dancante kaj eĉ fajfante "La Espero"n far de papagoj. Ne gravas kiel temporaba aŭ absurda la ideo estas, la proponanto elspezos pli da tempo, energio kaj rimedoj instigante al la samideanoj ĝin subteni, ol kunlaborante por fortiĝi la lokan grupon kaj

landan asocion. Eble ni verduloj de "La Ora Ŝafpelto" ne estas tute eksterkritiko; ja, ni subtenas la lokan klubon, sed forte strebas por montri ke la movado antaŭen marŝos pli rapide se ni fondos rondon de verdaj drinkantoj en ĉiu drinkejo de Britio. Ni jam havis praktikan rezulton, ĉar Vinĉjo interesiĝis pri Esperanto pro niaj renkontiĝoj en la drinkejo. Li lernis la lingvon, aliĝis al la Klubo, E-AB kaj UEA, kaj se li ne ofte ĉeestas la kunvenojn tio estas pro la amikiĝanta efiko de la lingvo, kiun li praktikas farante en konsento paran rondon familian dum eksterurbaj eventoj.

Nu, se ni povus havi rondeton de verduloj en ĉiu drinkejo de Britio kaj al ĉiu rondeto aliĝus entuziasmo kiel Vinĉjo ni havos pli ol cent-mil novajn anojn de E-AB! Ni eĉ povus konvinki tiam al bierfabriko, produkti specialan verdan bieron por niaj kongresoj!

Alariko

GRATULON

Du el niaj membroj elstare distingigis en la nunjaraj Belartaj Konkursoj de UEA.

Albert Goodheir ricevis la unuan kaj duan premiojn en la sekcio Poezio kaj solan premion en la sekcio Eseo.

Karolina Gilmore ricevis la unuan kaj duan premiojn en la sekcio Teatraĵo kaj la trian premion en la sekcio Poezio.

Ni varme gratulas ambaŭ premiitojn. La premiitaj verkoj aperos, cetere, kiel kutime en la literatura revuo FONTO, jam en ĝia sesa jaro: ĉu vi abonas ĝin?

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from: Dr. K. M. Hall, 37 Granville Court, Cheney Lane, OXFORD, OX3 0HS.

NIA TRADUK-KONKURSO: RAPORTO

Via redaktoro estas tre dankema al ĉiuj partoprenintoj de nia traduk-konkurso, ĉar per komparado de la diversaj tekstoj li lernas multon pri "la plej malfacila arto". Tiu komparado konfirmas, ekzemple, la gravecon de la stilo (kiun oni devas rekrei, ne perdante samtempe redonon de precizaj nuancoj).

En la tradukota teksto troviĝis interalie kelkaj "ŝlosilaj frazoj", kies interpreto kaj redono estis aparte delikataj. Ekzemple, *ĉirkaŭbrakis min supraje*: ĉu "lightly embraced me", "put his arms round me superficially", gave me "a perfunctory hug" or a "token embrace"? *Fakte* evidente signifas "in fact", sed ĉu tio estas la plej natura anglajo – ĉu oni diru "to tell the truth", aŭ "actually", aŭ "as a matter of fact"? *Ne venis subite*: ĉu "was not unexpected", aŭ "hadn't come suddenly", aŭ "did not happen out of the blue"? Minimume du frazoj estis malfacilaj, ĉar idiotismaj. La unua estis *Bonvolu nur*. Por kompreni tion, necesas koni intime la efektivan internacian parollingvaĵon. Ĉi tie, kompreneble, ĝi havas nuancon ironian. El la proponitaj solvoj nur "All right, then" ŝajnis al mi kontentiga. Mia propra traduko estintus "Get on with it, then". Pri la alia frazo, temis bedaŭrinde pri (damninda) preseraro: *trinkis akvon kun* (anstataŭ: *kune*). Tion evidente supozis ĉiuj konkursintoj krom unu: D-ro Hall gratulinde tradukis korekte la tekston prezentitan (vd. sube).

Kiel oni aljuĝu premiojn inter tiom da bravaj konkursaĵoj? Nu, ĉiuj tradukoj enhavis plusojn kaj minusojn. Plusoj estas brilaj eltrovoj, ekz-e: *malicis* = "taunted"; *senkurenta* = "power cut"; *tre rapide* = "in a trice", ktp. Minusoj estas mislegoj aŭ misinterpretoj de la teksto, ekz-e: *maltrankviliga* estas nek "agitation" nek "unquiet"; *glatigis* ne estas "threw off", ktp. Ellaso de unu tuta propozicio ne apogis la ŝancon de

unu konkursinto. Pesinte la plusojn kaj minusojn, kaj frandinte la diversajn stilojn, via redaktoro aljuĝis jenajn premiojn: Unua premio (en egaleco): D-ro K.M. Hall kaj Malcolm Jones; tria premio: Krystyna Ungar. Ni presigas sube la tradukon de D-ro Hall. Nur ŝia versio de "Bonvolu nur" estas nepre nekontentiga.

INTERIOR, IN SHADOW

I felt like a length of used sellotape. Try to use it again, it won't stick. Or worse, I felt I was being torn away from what I was stuck to, in a cloud of hurtful dust. "Why did you allow it? Why did you let yourself get stuck like that?" a spiteful voice was asking inside me, while our we was coming forcibly unstuck into him and me. Forcibly? Not quite. I needed force to get unstuck. He didn't. Or much less.

The electricity was off that evening. Something had gone wrong. I searched in the dark for candles. Found them. And matches. He was sitting brooding at the table. I talked about little things, not trying to guess. He spoke my name and I let go of the candles and turned and looked at him. There was something disturbing in his tone. I suddenly understood, and froze. But I wouldn't believe it. I didn't want to understand.

I stood in the passage while he took down his coat. I watched how the right sleeve went on, then the left. I wanted him to button it slowly. He did it very fast. Nothing to give me a break. He took two steps and put his arms round my shoulders. And of course I did the most shaming thing I could, I cried. I saw two tears fall on the fur of his jacket. He got loose from me quickly and strode out. The door closed. I heard his shoes squeak, and the front door open and shut. I knew he was walking along the front path, and turning, and going away. Going away.

In fact, that candle-lit evening hadn't come suddenly. I'd felt for some time that we were on a downward slope.

Why? But why do relationships break up?

I remembered Tolstoy. The bit about happy and unhappy families. "All happy families are alike. Each unhappy family is unhappy in its own way."

"Now it's your turn to be unhappy. It happens to everyone!" the inner voice pontificated, pleased at hurting.

Only be kind enough. A downward slope.

When I was mountaineering I even enjoyed that moment when I felt myself driven downward by gravity. If you like it, it's a good feeling running down a mountain. If you don't like it, your muscles hurt trying to brake. I was braking. But I was still going down.

* * *

What next?

The house filled with silence, suffocating. What next? What next? The vain question groped for an emergency exit.

"Go back to the kitchen! Start doing something!" someone inside me ordered gently. "Here's the kitchen, open the door."

I saw the dirty crockery and meant to

wash it. But suddenly I couldn't stay on my feet. Sorrow turned my ankle-bones to water and I had to sit down on the nearest chair. Opposite was his empty place. I waited a few moments. Before silence strangled me, the ironic voice was back commanding solemnly: "On to misery!" Seeing me sitting paralysed, it understood that such solemnity was going too far. But it didn't apologise.

"Try to move your head to the right – to the left!" And I did. Not to please myself, but to show I was trying to co-operate. And it encouraged me to get up, and pushed me to the sink with the dirty crockery.

When I came to his teacup I gave in. Or did the voice give in?

Go to bed?

Telephone a woman friend?

The voice was very kind. I'd thought earlier that it could only be ironic. It darkened my room for me, darkened it still more, and patiently smoothed my bedclothes, helping me fight against sleeplessness, against broad wakefulness. We paced the room and drank water-with-a-dash. In the morning we both had purple rings round our eyes. Only mine were rather darker.

ARGENTO

Walter de la Mare

La luno lanta nun silente

Premas la nokton paŝ-arĝente.

Ŝi vidas ĉie, disrigarde,

Arĝentajn fruktojn arĝent-arbe.

Fenestrojn sub arĝent-tegmento

Eklumigas lun-arĝento.

En la hundej', al dormo ceda,

Kuŝas la hund' arĝent-pieda.

En ombraj nestoj, duonlume,

Kolomboj dormas arĝent-plume.

Jen mikromuso kureg-ula,

Arĝentunga, arĝentokula.

Kaj fiŝoj arĝentas sen mov', sen bruo,

En arĝent-junka arĝent-fluo.

Tradukis **Katolina Halo**

Ĉiutaga Esperanto

NOVA AŬTO KAJ NEGLIĜO

“Tiu pesta edzo mia!”

“Kion li faris nun?”

“Vi scias, ke li erodas (*is running in*) la motoron de nova aŭto, ĉu ne?”

“Vi diris, ke la kompanio donos al li novan pli luksan aŭton, kiam li ricevos sian pli altan postenon.”

“Nu, li jam ricevis ĝin, sed li malpermesis al mi konduki ĝin, ĝis li estos finerodinta la motoron. Li opinias, ke mi ĝin kondukos tro rapide.”

“Sed vi estas tre zorga kondukanto!”

“Tiel mi opinias. Li diris, ke li konfidis al mi (*entrusted me with*) la lastan novan aŭton, kaj ke mi ĝin difektis.”

“Ĉu vere?”

“Laŭ li! La motoro estis preskaŭ finerodita, sed mi malfruis por dentista rendevuo. Li pli alte taksas (*thinks more of*) tiun aŭton ol min. Kiel mi diris tiam, la abscesa doloro igis min forgesi. Sed mi ne tre rapidis – vi konas min tro bone por kredi tion.”

“Kial li ne mem ŝoforis vin?”

“Li estis for por aferoj (*on business*), kaj lasis la aŭton en la aŭtejo.”

“Ĉu li akiris sukceson?”

“Post televidea reklamo, la pluŝursoj havis neatenditan debiton (*there was an unexpected demand for teddy bears*), kaj li volis kapti la merkaton. Li vendis amase al du-tri tutlandaj ĉenmagazenoj, kaj pro tio, post ses monatoj, la firmao promociis lin. Li redonis sian aŭton, kaj ricevis la nunan. Sed la vivo estas pli ol la vendado de pluŝursoj kaj pupoj, kaj pli ol novaj aŭtoj.”

“Nu, la viroj emas ĉiam orgojli (*be conceited*), kaj por ili aŭtoj estas idoliĝoj adorendaj. Tamen, se vi riverencos antaŭ li, kaj petegos, ke li vin indulgu (*be lenient to*), ĉu li ne pardonos vin?”

“Mi certe ne riverencos. Mi estas skrapapiŝo (*doormat*) por neniu. Kiam temas pri aŭ vendado aŭ la ama aŭto, li estas blinda kaj surda je ĉio alia. Lia direktoraro estas tre severa, kaj ĉiam li timas, ke li estos degradita (*demoted*),

aŭ maldungita. Kial, mi ne povas konkreti, ĉar kvarfoje en naŭ jaroj li gajnis la titolon Vendisto de la Jaro, kaj trifoje li estis promociita.

“Ĉu li estas tute sana?”

“Supozeble. Kial vi demandas?”

“Nu, mia onklo tiel vendegadis, ĉiam celante promocion. Kiam li posedis ĝemeldomon (*a semi*), li sopiris apartan domon. Post tio li bezonis ĉion plejlaste laŭmodan. Li estis tre sukcesa. Tamen, li iĝis ĉiam pli timema, suspektis ĉion, akuzis ĉiun, kaj fine suferis de psika kolapso. Li perdis la laboron, kaj devis vendi sian vere grandan kaj luksan domon por kvitigi sin de (*pay off*) siaj ŝuldoj. La nepagita hipoteke (*mortgage*) estis granda. Bonŝance, li havis sesdek jarojn, do li emeritiĝis frue, kaj nun havas sufiĉe por komforte, se ne lukse, vivi.

“Bonŝance por li! Sed mia edzo havas nur kvardek jarojn; kaj se mi devos atendi ĝis lia sesdeka jaro preĝante, ke li psike kolapsos, mi mem troviĝos en la frenezulejo. Sed staradi babilante ne plibonigos la situacion. Mi iras la bazaron por butikumi. Eble se mi donos al li lian preferatan vespermanĝon, tio ŝanĝos lian humoron (*mood*).”

“Kun vino, evidente”

(*Ridetante, malgraŭ la antaŭa kolero*)

“Kun kandeloj, eĉ!”

“En punta negliĝo (*lace negligee*), sendube!”

“En diafana negliĝo el nigra punto. Ho dank’ al Dio, ke mi renkontis vin! Kia toniko vi estas! Mi vere suferis de la spleno (*blues*). Mi sciis, ke li tro laboras, kaj tio dum longa tempo min maltrankviligis. Sed vidu la horon! Se mi ne nun iros la bazaron, mi ne finbutikumos akurate, kaj se ne, mi devos doni al li nur fromaĝsandviĉojn pro manko de tempo por kuiri. Se jes, eĉ punta negliĝo min ne savos!”

* * * *

NOTO: DEBETO/DEBITO

(1) *Debeto* troviĝas en la ‘Oficiala Aldono’ por la angla ‘*debit*’.

(2) *Debito* estas Zamenhofa vorto trovebla en PV kun la signifo: 'facila podetala aŭ pogranda vendado de varo'. PIV aldonas al la difino: 'serĉateco de varo'. (La faka 'International Business Dictionary in Nine Languages' simile distingas.) *Debito*, do, respondas al la anglaj: 'a ready sale', 'a (good) market', 'a demand'.

(3) Butler en sia ĝenerale bonega 'English-Esperanto Dictionary' forstrekis *debetu*, dirante, ke ĝi estas 'not recommended', kaj anstataŭis ĝin per *debito*, kiun li tradukis, 'debit'. Tion farante, li:

(a) malrekomendis vorton OFI-

CIALAN (!); kaj (b) tute ŝanĝis la signifon de fakvorto Zamenhofa. Pro tio ekfariĝis bedaŭrinda konfuzo ĉe konsultantoj de lia vortaro.

(4) Notindas, ke en la flugfolio 'False Friends' verkita de Butler, kaj reviziita de D-ro J. C. Wells en 1972, *debito* estas listigita kiel 'false friend', kaj *debetu* kaj *debito* estas ĝuste tradukitaj konforme al la difinoj en PV kaj PIV. Vidu ankaŭ 'Esperanto and English Dictionary' de J. C. Wells, kiu havas tradukojn laŭ PV kaj PIV.

Don Lord

Tradukis N.L.

KANTOJ POR KONTRALTO

Kanto de la Fe-reĝino (Iolante, Akto 2)

Ho, stulta fe', ĉu pensas vi, Ke ĉar lin plej ekamis mi,

Mi malobeus leĝojn ĉi?

Ke ĉar mi flugas alte for, Kiel kolombo en l'aŭror'.

Min kaptus sagoj de Amor'?

Min kaptus sagoj de Amor'? Ho, de Amor'!

Pensu pri Ovidio! La koro mia, kiel lia, dronas en poezio!

(Ĥoro) Ho, de Amor'! Pensu pri Ovidio!

(Reĝ) La koro mia, kiel lia, dronas en poezio!

Sur fajran ardon de la tent' Mi verŝas akvon de prudent'.

Ĝi malaperas en silent'!

La fean leĝon gardu ni, Necesan bazon tie ĉi.

Ni gajnos Kapitanon Shaw!

Ni gajnos Kapitanon Shaw! Ho, bravan Shaw!

Amtipon subkaŝitan! Ĉu lia trupo eĉ estingus mian amon spritan?

(Ĥoro) Ho, bravan Shaw! Amtipon subkaŝitan!

(Reĝ) Ĉu lia trupo eĉ estingus mian amon spritan?

(Ĥoro) Mi dubas!

Kanto de Katiŝa (La Mikado, Akto 2)

Soleca! mi tamen vivas!

Ho, tombo vi! L'animon tenas mia korpo plu!

Feliĉa paco venus kun la mort'

Sed ne por mi! plu vivi, mia sort'!

Koroj ne krevas! Batojn ricevas, Pri amo revas, Sed mortas ne!

Per tuta fort' sopiras por mort'; Jen mia sort', vivanta mi!

Vivanta mi! Jen, tie ĉi, Malesperante, Sed atendente,

Vi kial restas? Ĝoj' forestas.

Vivanta mi! Jen, tie ĉi, Malesperante, Sed atendente,

Ĉu ankaŭ trompos min la mort'? Ĉu ankaŭ trompos min la mort'?

Notu: Kapitano Shaw estis bone-konata ĉefo de la Londona Fajrbrigado, kaj estis en la aŭdantaro ĉe la unua prezentado de 'Iolante'. Ovidio estas la bone-konata latina poeto de Romiaj tempoj.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Adekvataj tradukoj

Kompatinda Sankta Sebastiano Rossetti! Senti sin surpafata samtempe de ĉarma feministo Sally Phillips kaj porka viristaĉo Rik Dalton, kvazaŭ neŭtralulo kiu bonintence vagas en neniesa teritorio (ĉu mi kuraĝus angle diri "no man's land")!

Tamen en la maja/junia numero de L.B.E. mi provis defendi lin kontraŭ la sago de Sally, montrante ke la uzo de "li" por ajna ŝekso ne estis ia kontraŭvirina inventaĵo de Reto sed estis kontraŭmaskla Zamenhofaĵo.

Kaj mia komento? Mi tute ne opiniis, ke li ne sufiĉe laŭdis mian tradukprovon. Fakte mi sentas min flatita de liaj afablaj vortoj. Mi nur deziris kontesti la sugeston, ke adekvata traduko ne eblas – tio estas, ke *Esperanto* ne kapablas liveri taŭgan tradukon.

Mi ja ne sugestis, ke mi kreis poezian majstrajon: mi nur deziris montri, ke mi solvis la mekanikajn problemojn de la traduko – tiel pruvante ke, se nepoeto povas tion fari, sendube Esperanta poeto estus povinta fari adekvatan poezian version.

Iaj mankoj venis el la tradukanto, ja ne el la lingvo.

Rik Dalton

Landnomoj

Ĉu vi povos sciigi min, kial la landnomo *Irano* ĉiam aperas en la rubriko *Volas korespondi* sub la *majuskla angla* formo IRAN? Probable por la plejmulto – kiu, cetere, ŝajne ne rimarkas ĝin – nur tre facile pretervidebla eta misaĵo, sed por mi grandega kuspo, kiu ofendas kaj mian lingvan kaj mian estetikan senton!

Graham Blakey

Nigra Listo

Loka gazeto en Richmond kaj Twickenham presis artikolon pasintan jaron

ke Toby Jessel, Parlamentano de Twickenham, "estas renegatlisto" (tiele). Ĝi rifuzis presi ke Jeremy Hanley, Parlamentano de Richmond, estas ne nur membro de Parliamentary Esperanto Group sed eĉ eklernas la lingvon.

Do, en mondo kies komunikiloj pli interesiĝas pri malbonaj ol pri bonaj novaĵoj, la "Renegatlisto" estas mirinda ideo – mi rajtas laŭdi ĝin ĉar ĝi neniel estas mia.

Ĉiam bonus se kritikantoj citu nur verajn faktojn. Stanley Nisbet terure malpravas se li supozas ke iu ajn Parlamentano "... ne respondinte al invito subteni ... priskribita kiel malamiko". Ĉiu ajn kies nomo aperis sur la "Nigra Listo" fakte *esprimis sin malfavore* al Esperanto – kaj en demokrata lando oni rajtas citi kaj uzi la opiniesprimojn de politikistoj.

Peter Danning

Comprehensive, ktp

Phyllis Goodheir demandis kiel esprimi la anglan edukan terminon "comprehensive". Nu antaŭ longe mi decidis al mi, ke "comprehensive school" devas esti *komuna liceo*, sed mi al neniu diris kaj mi ankaŭ ne havis okazon uzi la esprimon. Sed du-tri jarojn poste mi ekvidis el Svedujo raporton, kiu uzis ĝuste tiun terminon, do mi konkludis, ke ĝi estas komprenebla ankaŭ internacie.

Sed pri "comprehensive education", hm. Kion ĝi propre signifas? Ĉu la programon sekvatan en ĉiuj skotaj duaj lernejoj (senior kaj junior secondary: laŭ angla stilo grammar (gimnazio) kaj la iama secondary mod. (verŝajne liceo)? Aŭ ĉu temas pri distingo inter ĝenerala lernejo kaj faka lernejo, ekzemple teknika? Alilande oni kelkfoje skribas "real-lernejo", supozeble lernejo, kiu ne instruas latinon kaj grekan, sed tendencas pli al teknikaj kaj komercaj lertoj. Nu necesas konscii, ke diversaj landoj havas diversajn edukostrukturojn (vidu jam Skotlandon kaj

Anglujon!), kaj ĉefe oni zorgu, ke skribante alilanden oni estu komprenata. Kaj "inkluziva" aŭ "ampleksa" edukado estas eble neklara, ĉar ekzemple la skota alternejo (aŭ gimnazio) havis (almenaŭ kiam mi loĝis tie) programon *ĝeneralan* aŭ ĉiufakan.

En n-ro 70 Rik Dalton atribuas al mi la diron, ke virgino, belino, karino k.s. "taŭgas nur por poezio!". Tia ekskluziva deklaro estas tute fremda al mia penso. Ili estas uzablaj kaj punkto. Se li volas scii kial tamen *belulo* sonas normale, sed *belino* malklare ĝenas la lingvosenton, li simple legu la vortofaran teorion de Kalocsay, eminente klaran sur ĉiu paŝo, ĉar ĝi analizas la faktan uzadon de la lingvo. Kaj ĝi aperis multloke: en Lingvo stilo formo, Arĝenta duopo, Plena analiza gramatiko, kaj Kalocsay: Dek prelegoj.

Reto Rossetti

Lojale justa

Multe mi dankas al ĉiuj, kiuj interesiĝis sufiĉe por respondi al mi pri 'fair'. Vere oni kovris la tutan gamon da sencoj(!) krom tiu, kiun mi serĉas. Eĉ nia Redaktoro en sia piednoto ĉe "Is it fair": (N-ro 867) konfesas 'Hazarde mi devis trifoje lastatempe traduki la vorton "fair". Mi dufoje tradukis per "lojal-", unufoje per "just-". Kial, kun respekto, li ne rekte elektis unu aŭ alian kiel la precizan, se la dua difino de 'lojala' en PIV respondas ĝuste al la senco de 'fair' pri kiu estas nun la parolo?

La vorto 'lojala' ne aperas en la Universala Vortaro. La "*Unua Listo de Zamenhofaj Vortoj ne troveblaj en la Universala Vortaro*" aperas en la "Oficiala Gazeto N-ro 1. (1908/09) sed 'lojala' ne troviĝas en ĝi. La listo prepariĝis inter 1905 (post la unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo s/Maro, kiam la Lingva Komitato naskiĝis) kaj la presdato en 1908. Tamen, dum sia Kongresa Parolado de 1908 en

Dresdono, D-ro Z. uzis tiun vorton 2 fojojn:—

- 1 "Memoru, ke Esperanto estas nenies propraj, ke la Esperantistoj havas plenan rajton fari kun ĝi ĉion, kion ili volas, se ili nur faros ĝin singarde, lojale kaj interkonsente."
- 2 "Ĉar vi ĉiuj konfesas, ke la esenco de nia lingvo estas ĝusta kaj oni povas disputi nur pri detaloj, tial ĉio bona kaj ĉio efektive necesa povas facile esti farata en ĝi per vojo lojala, en harmonio kaj paco."

En kiu senco D-ro Z. uzas 'lojala' tie? Kaj kie li trovis ĝin? Eble li uzis ĝin unufoje en Dresdono, kaj tial ĝi ne aperas en la Unua Listo; kaj eble KABE tial prenis tiun tiaman neologismon kaj metis ĝin en sian "Vortaro(n) de Esperanto" en 1910 (tria eldono 1922), kie li donas: "'lojala': fidela al la estro, al la leĝoj". Mi ne trovas 'lojala' en kiu ajn alia vortaro en alia senco ol tiu de KABE (sed eble mi ne sufiĉe serĉis en francaj vortaroj), krom en PIV. Mi nur volas scii, ĉu proponis duan sencan al tiu unu vorto, kaj kiam la Akademio studis la aferon kaj decidis akcepti proponon de esperantisto(j) kiu(j) jam konis duan sencan propralingve. Mi konkordas kun sinjoro E. Robert Penny, (N-ro 868) ke "Oni devas praktiki la precizecon de Z: 'unu vorto prezentas sole unu ideon' kaj traduki ideojn per vortoj el la jam sufiĉe vasta vortprovizo. . . ." Tial mi sugestis (BE N-ro 867) la vorton 'beljusta', sed neniu respondis pri ĝi; do ĝi ne impresas kiel taŭga vorto. Tamen, ju pli mi pensas pri ĝi, des pli mi trovas ĝin bona; ankaŭ la senco 'malbeljusta' taŭgas por mi en la senco de 'unfair'. Se mi estus mafiozo (kiel esprimi esperante tian tipon?) la vorto 'lojala' rilatus ambăusence sole al "La Honorata Socio" kaj tute ne al la homara socio ĝenerale. Tial mi daŭre serĉis kaj serĉas.

Kial ne serĉi en aliaj lingvoj ol la angla, franca, germana, ktp. Mi skribis al s-ro Bernard Golden en Hungario kaj esperas, ke li baldaŭ respondos kun

aldonaj sugestoj. Certe en iu alia lando oni havas koncepton pri "fair".

K. Gilmore

Kun respekto, Katerina, mi ne elektis unu aŭ alian pro tio, ke la signifo de vorto estas ĉiam influata de ĝia kunteksto (t.e. vorto apenaŭ ekzistas en izoleco). Mi trovas grandan diferencon — jes, grandan — inter "It's only fair to tell you I disagree with you" (Estas lojale . . .), kaj "Your proposal is fair to him" (estas justa, aŭ traktas lin juste). Ĉe futballudo (kie, se mi bone memoras, komenciĝis via pilgrimo!) mi certe krius al la arbitro: Maljuste! (Efektive mi estas certa, ke mi kaj John Francis ofte tion faris dum niaj junaj jaroj!).

HELPON

La franca E-Grupo de CHAMBERY bezonas helpon de nia samideanaro. Post plurmonataj klopodoj ĉe nia urbestro por ke nia urbo CHAMBERY honoru ZAMENHOF, nia E-Grupo sukcesis. La 9-an de junio, nia urbestro oficiale, kaj unanime, decidis ke skvaro nomiĝos: "SQUARE DOCTEUR ZAMENHOF".

La inaŭguro okazos, verŝajne, dum septembro kaj, propagandcele, ni dezirus ke ĝi estu la plej eble solena. Ni pripensis plurajn farindaĵojn por tiu inaŭguro inter kiuj solena transdono, al la urbestro mem, de amaso da gratuletoj alveninte el diversaj partoj de la mondo.

Jen kiel ni bezonas helpon. Skribu, ĉu propranome, ĉu nome de via E-Grupo, tian leteron al nia urbestro pro la decido honori ZAMENHOF en CHAMBERY, adresante ĝin al:

URBKONSILIO DE CHAMBERY

pere de

Raymond Boré

481, rue de Bertillet

F-73000 CHAMBERY

Francio

Kompreneble, ju pli da tiaj leteroj ni povos amase transdoni, des pli la "im-

agfrapo" estos forta. Gesamideanoj helpu nin! La tuta E-Grupo de CHAMBERY, simple sed sincere, antaŭdankas vin.

LA JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO JAM SKULPTITA

La belega skulptaĵo "La Espero" de la renoma dana skulptisto Jesper Neergaard, filo de la vicprezidanto de la Akademio de Esperanto D-ro Paul Neergaard, estas jam preta. Nun ĝi estas ekspoziciita en la parko de Montignoso (Italio) kune kun kvardeko da skulptaĵoj de aliaj konataj skulptistoj kaj elvokis la admiron de ĉiuj, kiuj vidis ĝin. Post la finiĝo de la ekspozicio en septembro, la skulptaĵo estos transportita en Graz (Aŭstrio), kie ĝi estos solene inaŭgurita dimanĉon, la 19an de julio, kadre de la Jubilea Esperanto-Konferenco okazonta en tiu pitoreska urbo de la 18a ĝis la 25a de julio 1987.

Laŭ la sugesto de la subskribinto, la skulptisto dediĉis sian verkon al La Internacia Lingvo (Esperanto) por la Jubilea Jaro. Stajn kreaŭn inspiron kaj laboron la skulptisto donacis al Esperanto pere de la subskribinto, kiu transprenis personan respondecon por starigo de la Jubilea Monumento. Restis, tamen, la efektivaj kostoj por aĉeto de la plurtonaj marmora kaj granita blokoj, salajroj de la laboristoj, transporto ktp. en alteco de minimume 100.000 danaj kronoj. El tiu sumo jam estas kolektitaj 77.000 danaj kr., inkluzive la subvencio de 50.000 aŭstr.ŝil. (ĉ 25.000 dkr.) kiun donis la Urbo Graz. Do, mankas ankoraŭ minimume 23.000 dkr.

La subskribinto, kiu, kompreneble, jam kontribuis, petas ĉiujn esperantistojn, Esperanto-organizaĵojn kaj amikojn de Esperanto konsideri donacojn por tiu celo. Kontribuojn en alteco de minimume 500 danaj kronoj aŭ egalvaloro oni bv. sendi al ICNEM, poŝta ĉekkonto Kopenhago 1 19 06 01, c/o S-ro Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2810 Rødovre, Danlando. Se pli konvene, oni povas sendi la donacojn

en alteco de *minimume 40 anglaj pundoj* ankaŭ per ĉeko al la subskribinto je lia adreso: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio.

La donacintoj havos honorajn lokojn dum la inaŭgura ceremonio. Iliaj nomoj troviĝos en speciala Jubilea Dokumento, kiu estos deponita en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kaj ĉiu donacinto ricevos fotokopion.

Kiam multo pri la Jubilea Jaro estos jam delonge forgesita, la Jubilea Esperanto-Monumento restos kiel daŭre belega memoraĵo pri tiu unika kultura evento.

Ivo Lapenna

NEKROLOGOJ

CLARISSA TURNER

Post grava malsano Clarissa Turner mortis en Junio. Ŝi estis fervora Esperantisto dum pli ol 25 jaroj, kaj Komitanto de la Nord-Okcidenta Federacio dum 20 jaroj.

Ŝi deĵoris samtempe en du Esperanto-Societoj, tiu de Manĉestro, kaj tiu de Stockport, kie efektive ŝi estis organizanto ne nur de la klubaj agadoj, sed ankaŭ de multe da ekspozicioj. Pri ĉi tiuj, ŝia profesia lerto kiel artisto ŝin gvidis.

Kiel rakontisto ŝi havis veran talenton, kaj ŝia stoko de amuzaj anekdotoj, ĉiuj tirataj el la propra vivo, ŝajnis neelĉerpebla.

En la movado troviĝas homoj ja pli konataj ol ŝi, sed sen la senĉesa laborado post la kulisoj de tiaj homoj, kiaj Clarissa, la movado vere ne daŭre ekzistus. Ĉiam helpema kaj kompatema, ŝi prizorgis Esperantajn taskojn ĝis la subita morto. Ŝi lasas neŝтопеblan breĉon en nia afero.

Don Lord

Kun granda bedaŭro ni anoncas la morton de nia ano Norman Townson, kiu aliĝis al la bradforda grupo en 1950 kaj, ek de 1940, laŭ raporto en protokolibro, estis interesulo.

En 1951, li ĉeestis la Universalan Kongreson en Munkeno, al kiu li veturigis tri aliajn grupanojn. Kun aldona vojaĝanto, li estis en Oslo en 1952 kaj, kune kun lia edzino Peggy, en Mainz en 1958. En 1961, li deĵoris en la LKK en Harrogate.

Al multaj Britaj Kongresoj li veturigis grupojn de Bradfordanoj kaj al almenaŭ unu internacia aranĝo en Helsingor, kune kun lia edzino, kondukis grupon de junulinoj de la preĝejo kie li ankaŭ deĵoris ek de sia juneco.

En nia federacio, Norman estis mallonge sekretario kaj almenaŭ unu fojon prezidanto. En la Bradforda Societo li estis unue socia sekretario kaj poste grupsekretario sed pli longe li prezidis en niajn kunvenoj. Kiam lia sanstato ne plu permesis al li ĉeesti grupkunvenojn, kiel dankesprimio, ni kreis por li la oficon Honora Prezidanto.

Ĉion ĉi tion faris Norman Townson, sed ni kiuj konis lin, memoras lian spritecon, bonhumoron kaj afablecon, precipe al novuloj, kiujn li ĉiam bonvenigis. Ni havas multajn feliĉajn rememorojn pri amuzaj ekskursoj kaj pri festetoj ĉe Norman kaj Peggy, al kiu ni etendas sincerajn kondolencojn.

Post kelkaj jaroj de malsano kaj malfacilaĵoj kuraĝe eltenitaj, nia amiko Norman Townson lasis ĉi tiun vivon, trankvile, je la 6a de julio.

MALLONGE

La tria kunsido de la Esperanta fako de la britbulgara amikecsocieto okazos merkredon, la 15an de oktobro 1986 je la 19a horo. Ĉar la britbulgara amikecsocieto ŝanĝos sian oficejon, bonvolu demandi la provizoran organizanton, Johano Spencer (01-800-0454 – 30 Adolphus Road, London N4 2AY) dum la dua parto de septembro pri la loko de la kunsido.

* * *

La Esperanto-grupo de la Ruena Regiono (Franĉujo) organizos kvar semajnfinojn lingvajn kaj kulturajn. La

unua el ili okazos la 29an kaj 30an de novembro 1986 en la urbo Rouen, Normandio (120 km for de Parizo). Petu informojn ĉe Pascal Dubourg, 43 rue Desseaux, 76100 Rouen, Francujo.

* * *

La Venezuela Esperanto-Asocio estas organizanta Internacian Festivalon pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo inter la 11a kaj la 19a de oktobro 1987 en la ĉefurbo, Karakaso. Per tiu festivalo oni festos la centjaran datrevenon de nia lingvo. Adreso: Apartado 47675, Caracas, 1041-A Venezuelo.

* * *

Esperanto-Ligo de Komunumo Osijek preparas la trian internacian renkonton "Ivan Flanjak", kiu okazos la 20an, 21an kaj 22an de marto 1987 en Osijek, Jugoslavio. Ĝenerala temo de la renkonto estos ESPERANTO KAJ TURISMO. Oni invitas vin ĉeesti kiel gasto, aŭ kontribui per esperantlingva referaĵo pri la temo. Limdato por aliĝo estas la 1-a de marto 1987. Prelegantoj ne pagas aliĝkotizon nek restadkoston, la Preparkomitato pagos por ili. ES "Liberiga Stelo", p.p. 27, YU 54000 Osijek, Jugoslavio.

* * *

La 79a Franca Kongreso de Esperanto okazos de la 5a ĝis la 9a de junio 1987 ĉe la lazura marbordo en komforta kaj bele lokita restadejo. Kiel kutime okazos du belaj ekskursoj; unu vizitos la interkrutejon de la rivero Verdon, la alia estos ŝippromenada laŭlonge de la Ora Kornico. Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe: Esperanto, Tour Vadon A, F 83700 St Raphael, Francujo.

* * *

NOVAJ LIBROJ

La Konflikto de la Epokoj, libro 2, de Edwin de Kock. Diadone, Honingnestkrans, Pretoria, Respubliko de Sud-Afriko; 1985.

Jen, gratulinde frue, la dua libro el la vastskala historia kaj religia epopeo kies unua libro recenzigis tie ĉi en 1985. La aŭtoro jam ŝanĝis iom sian planon; nun la apostrofo reaperas, Kanok iĝas Henoĥ, kaj la kvin libroj projektitaj kreskas ĝis sep. Ĉu la dua estas nura ponto, deviga kaj seninteresa, inter tiu, aperinta, pri la Kreo, kaj tiu, venonta, pri la Elaĉeto? Certe ne; la enhavo kaj la klimakso de la dua libro estas tiel gravaj kaj tiel emociantaj kiel tiuj de la unua.

Por legintoj mi rememoru, por nelegintoj mi klarigu, ke tie Honoĥ rakontis al la poeto (Danteska figuro instruata per Vergiliaj gvidantoj) la historion de Lucifero. Al tiu, pekinte kontraŭ la Eternulo per aroganteco, envio kaj kolero, Dio permesas agi libere por "ke li finfine konvinkigis mem" pri sia malpravo kaj la pravo de la Sinjoro. Vojaĝante per tempmaŝino, la poeto fariĝas observanto de la homa historio, la Prapeko kaj la Diluvo. Dume, lin hantas la vizio de belega virino kies trajtoj retroviĝas en Eva kaj en anonima viktimo de la Diluvo. La rakonton interrompas la lamentoj de Adamo, de Noa, kaj de Lucifero mem, pri la civilizacio atlantida kaj antaŭdiluva kiun li kreis kaj ruinigis.

En la dua libro Moseo anstataŭas Henoĥon, por montri al la poeto la persiston de Abrahamo tra multaj afliktoj. Mankas la oferado de Isaako; sed pluraj tremigaj oferoj anstataŭas ĝin, kaj oni antaŭvidetas la kulminan en impona bildo:

*La vorto prakoncepta . . .
streĉkirlas estopunkton . . .
multecon fro l' o nula . . .
kaj vasta siluet' ne homa (tamen
homo)
sin klinas super la planedo . . .
Nube
la Reg' kun trapikitaj manoj . . .*

Ho ve, tiu bela bildo nur enkondukas la malbelan klimakson de la libro; Moseo frakasas la du tabelojn komunikante al la homoj la volon de Dio por

ili, kaj masakrigas ĉiujn el sia devojaĝinta popolo, escepte nur de tiuj (kiel Abrahamo, kiel la oferitaj viktimoj) kiujn "la Patro agnoskas kiel siajn". Severa kondamno? sed, laŭ Moseo, "ĉiu nur volanta estas Lia". Same Jesuo, kvankam ne en ĉi tiu libro, diris, "Kiu ne estas kun mi, tiu estas kontraŭ mi", sed ankaŭ, "Tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni." Eble en la tria libro, atendata ankoraŭ pli avide, de Kock proponos sian akordigon de la severeco kaj la kompato de Dio.

Katelina Halo

"Revido" Stereofona kaseda sonbendo, 10 originalaj kantoj en Esperanto. Kantas Akiko Tanaka Eldonas Tokia Esperanto-Kooperativo (TEKO), Japanujo, 1986.

Dum longa tempo, mi opiniis, ke la originalaj kantoj de Hiroŝi Nobukuni meritas pli vastan ekkonon. La muziknotoj de la melodioj, kaj la tekstoj jam eldoniĝis antaŭ dek jaroj en la japanaj kantlibretoj "De Kant' al Kanto", sed mi dubas, ĉu multe da ne-japanoj konatiĝas kun la kantoj tiamaniere. Jen do, ideala maniero konatiĝi kun ĉi tiuj belaj melodioj. Tokia Esperanto-Kooperativo eldonis kasedan sonbendon kun dek el la kantoj de Hiroŝi Nobukuni en prezento de Akiko Tanaka. La kantistino ankaŭ ludas elektran orgenon, kaj Hiroŝi akompanas per la piano. Aparte plaĉaj estas la lastaj kantoj sur ambaŭ flankoj – "Pluvo en Paris" kaj "La kvieta Pasio". Tiu lasta aludas al la strebo de Esperantistoj, kvankam ĝi ne rekte mencias tiun temon. En ambaŭ la melodioj kaj harmonioj estas tre belaj. Iomete ĝoŝa estas la vibrado en la kantvoĉo de f-ino Tanaka, sed tiu malagrablaĵeto estas ja nenio, kompare kun la plezuroj kiujn ni spertos dum la aŭskultado de tiu ĉi kantokolekto. Inkluzivataj estas la tekstoj de ĉiuj kantoj kaj la prezento de la kasedujo kun desegno de Saĉiko Saŭa (alinome, s-ino Nobukuni) estas tre plaĉa.

Andreo Marshall

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minime 20 vortoj. Antaŭpagenda.

Kiu volas vendi al mi ekzempleron de "Horizonto de Soveta Litovio" (kvara kajero)? Antaŭdankon. W. Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, FK14 7HG.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) celas instigi homojn per Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Rd, Romford Essex RM6 6EB.

Practical Esperanto. 19-21st September 1986. Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Allan Nutton, Stephen Thompson. Book early for this increasingly popular weekend! Forms and information from the Principal, Knuston Hall.

Volas korespondi

S-ino Margareta Hansson, 75-jara komenkanto volas havi leter-amikinojn en Britujo. Lernas en studrondo por pensuloj. Adreso: Ravinvägen 17, 433 63 Partille, Svedujo. Nova Esperanto-Klubo en Ukraino volas starigi kontaktojn kun Britaj samideanoj. Skribu al: - Voloŝin Nikolaj, ul. Lvovskaja 63a KV 81, LUCK, Volinskaja OBL. SU-263018, U.S.S.R.

Jolanta REMIESNIK, ul. Krzywoustego 5/8, PL 66-400 Gorzow Wlkp. Pollando, 20-jara fraŭlino kiu laboras en poŝtoŝeĉejo kiel librotenistino volas korespondi kun Brita junulo pri ĉiu temo.



Hungara studento, 19-jara volas korespondi kun Britaj geknaboj, interesoj: danco, sporto, muziko, komputertekniko, angla lingvo, Esperanto, ekonomiko . . . Havas onklon en Anglio. Adreso: Bécsi út 104-108/438, Budapest 1034, Hungario. (foto) – Nomo: Vigh Fózsof.

Krzysztof MAKSYMOWICZ, 39-jara kuracisto/kirurgo, laboras en hospitalo, havas edzinon kaj tri filinojn, kvinmonata lernanto volas korespondi kun gebritoj. Ks. Brzoski 36,m.2, 91-315 Lodz, Pollando.

J. Peter Andrew, S.L.P. 1159 Bunda, Via Musoma, Tanzaniao, East Africa lernanto volas korespondi.

DEMECS Zsolt, Katoka u. 50, Budapest 1163, Hungario, 24-jara, unu-jara lernanto volas korespondi kun brita kamaradino. Li estas inĝeniero sed nuntempe studas psikologion kaj internacian komercon. Hobioj: muziko, belarto, filmarto, fotado, literaturo, ekonomiko, politiko, akcepti gastojn.



Shapoor ZAIDMORADY, pelak 72, Kuche Ahmade Zareh (Delbary), K.H. Khomeiny, Kode posti 51549, TABRIZ, Azarbaigan Shargi, IRANO, 16-jara knabo volas korespondi kun gebritoj. Intereso, medicino kaj futbalo, poŝtmarkoj. (foto).

University of Manchester
Dept. of Extra-Mural Studies, M13 9PL (Tel. 061-273 3333)

PRELEGOJ KAJ SEMINARIOJ EN ESPERANTO 1986

en Holly Royde, Manĉestro

prelegos Alan Nutton, Victor Sadler (antaŭvideble) kaj John Wells

24 – 26 oktobro 1986

ESEA KONKURSO

“Laboro en la dudekunua jarcento el la vidpunkto de laboristo”

Per esperant-lingva eseo de ne pli ol 3,000 vortoj pri la supra temo vi povas gajni

SENPAGAN PARTOPRENON, inkluzive de veturkostoj laŭ SATEB bontrovo, en KONGRESO de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) okazonta en Eŭropo.

Rajtas konkursi esperantistoj, kiuj loĝas en la Britaj Insuloj.

LIMDATO por ricevo de eseoj (prefere tajpitaj!) estas la **30a de Novembro, 1986**.

Kunsendu vian nomon kaj adreson. Ĉiu konkursanto ricevos informon pri la rezulto.

Alec Venture en kunlaboro kun Wim Prent prijuĝos la konkursaĵojn.

WORKERS ESPERANTO MOVEMENT (SAT en BRITIO) prezentas ĉi tiun premion honore al la JUBILEA JARO 1987. SATEB rezervas la rajton presigi la premiitan eseon.

Sendu viajn eseojn al: SATEB, 29 Farrance Rd, Romford, Essex RM6 6EB.